



**Grupo Esperantista de Bilbao**  
Barrencalle Barrena, 7-1<sup>a</sup> deks.  
48005-BILBAO (Hispanujo)

✉ *Redaktas:*

Jesús-Miguel García Iturrioz



**Kunven-tago:**

Vendredo (19:30-21:00 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

✉ [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

(La E-Grupo de Bilbao estis fondita la 20an de majo de 1906)

TTT-ejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

**Jar-kotizoj:** Normala: 60 €. • Familia: 70 €. • Juna (ĝis 30 jaroj): 20 €.  
**KUTXABANK-konto (IBAN-kodo): ES44-2095-0023-5122-1800-1550**

**APRILIO-JUNIO 2025**

**Nro. 143 (2/25)**



**LA VENONTA HEF-KONGRESO OKAZOS EN PORTUGALETE,  
14/18 JULIO DE 2026**

## La 84a kongreso de HEF, en Portugalete.



Dum la 83a kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) en Soria, estis prezentata la kandidatiĝon de nia E-Grupo por organizi la venontjaran kongreson.

Ĝi estis unuanime akceptata. La kongreso lokiĝos ĉe la UNED-sidejo de Portugalete kaj disvolviĝos **de la 14a ĝis la 18a de julio de 2026.**

La prezentado estis ilustrita per spektado de videofilmo, kies aŭtoroj estas niaj amikoj Yolanda Díez kaj Carlos Llama. Al komenco de la filmo apartenas la ĉi-supra bildo. Forta aplaŭdo akompanis la projekciadon.

Ankoraŭ mankas multe da tempo sed ni jam prilaboras la programon kaj okupiĝas pri diversaj aferoj.

Ĉiuj, kiuj deziros helpi en la organizado, ne dubu: kontaktu nin. Oni kreis vacapan grupon, kiu entenas tiujn, kiuj pretas helpi. Se vi deziras aparteni al tiu grupo, skribu al nia adreso [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com).

## Nia Grupo ricevis heredaĵon.



En la pasinta "Nia Ponto", ni informis pri forpaso de du junaj kaj koraj amikoj: **Txabi Gandiaga** en decembro kaj **Iñigo Belasko** en januaro.

Post kelkaj tagoj de tiuj forpasoj telefonis al ni oficistino de notariejo por sciigi ke nia kara amiko Txabi lasis monon en testamento por nia E-Grupo.

Estis granda surprizo ĉar li neniam parolis pri tio.

Koran dankon, Txabi. Vi restos porĉiame en nia memoro.

## Nova retadreso por la kongreso en Portugalete.

Por la venonta HEF-kongreso en Portugalete ni kreis novan retadreson. Pri kia ajn dubo aŭ demando, skribu al [\*\*portukongreso@gmail.com\*\*](mailto:portukongreso@gmail.com)

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 20 de junio, a las 19.00 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1<sup>º</sup> dcha. (Bilbao), con el siguiente

### **Orden del día:**

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2024.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2025.
4. Otorgamiento de poderes a la Presidenta y al Secretario para la firma de aceptación del legado de Txabi Gandiaga.
5. Información sobre la organización del 84<sup>º</sup> congreso de HEF en Portugalete. Aprobación de la tabla de cuotas de adhesión y del programa provisional.
6. Informaciones varias de la Junta Directiva.
7. Ruegos y preguntas.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas hispane legi supre, la **vendredon 20-an de junio, je la 19.00 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon de la E-Grupo de Bilbao en ĝia sidejo de Barrencalle Barrena, 7-1<sup>ª</sup> dekstre laŭ la suba

### **TAGORDO:**

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokolo de la lasta kunveno.
2. Same pri la spezoj de la jaro 2024.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2025.
4. Rajtigi la Prezidantaron kaj la Sekretarion por subskribi la akcepton de legado de Txabi Gandiaga.
4. Informo pri la organizo de la 84a HEF-kongreso en Portugalete. Aprobo de la kotiztabelo kaj de la provizora programo.
5. Informoj diversaj fare de la estraro.
6. Proponoj kaj sugestoj.

## Retaj komunikiloj de la E-Grupo de Bilbao.

Retejo: <https://sites.google.com/site/esperantobi/home>

Retadreso de la Grupo: [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

Retadreso por la kongreso en Portugalete: [portukongreso@gmail.com](mailto:portukongreso@gmail.com)

En Fejsbuko, serĉu "esperanto grupo bilbao"

Vacapa rondo (nur membroj de nia E-Grupo): petu aliĝon ĉe [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

## **Bilbaoanoj en la Hispana Kongreso en Soria.**

De la 1a ĝis la 5a de majo disvolviĝis la ĉi jara hispana kongreso en Soria. Oni povas substreki la perfektan organizon kaj la belecon de la urbo.

Bedaŭrinde nur tri membroj de la Grupo de Bilbao povis partopreni. Jen ili sur foto.



La tri bilbaoanoj pozas kun la Prezidanto de HEF, Àngel Arquillos, kaj lia edzino, Mariló Torres.

## Nia Prezidantino forveturis al E-kunveno en Nepalo.



Komence de marto, nia Prezidantino, Mila Mezo, veturis ĝis malproksima Nepalo por partopreni E-kunvenon. Sur la foto, Mila troviĝas en la dua vico, la 4a de dekstre, post virino kiu ludas gitaron.

## Kunveno de eŭskaj (kaj ne eŭskaj) esperantistoj.



La semajnfino de la 17<sup>a</sup> kaj 18<sup>a</sup> de majo en Donapaleu, loko situata ene de la tri vaskaj provincoj de Francio.

## Toño del Barrio komisiita pri ZEO-j.

Universala E-Asocio (UEA) komisiis al Toño del Barrio kunordigi komisionon, kiu okupiĝos pri la temo ZEO-j (Zamenhof/Esperanto objektoj). Li do serĉas homojn, kiuj interesiĝas pri tiu temo kaj pretas kunlabori, ĉu aktualigante informojn, kreskigante la nombron, diskonigante la jam ekzistantajn, aŭ proponante iniciatojn.

Sciigu lin pri via preteco kunlabori, skribu al la adreso [zeolisto@gmail.com](mailto:zeolisto@gmail.com), kiun li kreis por tiu celo.

(Dissendolisto "HEF-Informado". 08/03/2025)

## Agadoj okaze de la semajno de la libro.



Du junuloj, Irene kaj Adam, partoprenis en la sinsekva legado de "Don Quijote" en la kulturcentro Círculo de Bellas Artes, la 23-an de aprilo. Ĉijare la legado estis pli longa ol kutime, kaj ili legis la tutan 7an ĉapitron de la verko.

Madrida Esperanto-Liceo ankaŭ partoprenis en "La Nokto de la libroj", organizita de la madrida regiono la 25-an de aprilo, per la prezentado, fare de ĝia aŭtoro, Ana Manero, de verko pri la pentristino Maruja Mallo, apartenanta al elstara periodo de la hispana kulturo en la 20<sup>a</sup> kaj 30a jardekoj de la 20<sup>a</sup> jarcento. La libro, kun titolo:

"Maruja Mallo: Mucho más que una artista de vanguardia", kaj eldonita de SATeH (SAT en Hispanio), estas dulingva, hispana kaj esperanta.

En Fuenlabrado (Madrido) la loka esperantista asocio, FEL, estis invitita partopreni la 25-an de aprilo en aktivado por disvastigo de la libroj en loka lernejo. Oni muntis budon kun libroj en Esperanto kaj respondis la demandojn de vizitantoj.

La 26-an de aprilo oni organizis omaĝon al María Ángeles Maeso en la kvartalo Usera (Madrido). Mati Montero legis poemon en Esperanto, el la antologio "Ni iras, vidas", kaj anoncis la omaĝon kiun oni faris al ŝi dum la Esperanto-kongreso en Soria.

(*"Nia Voĉo"*. Organo de Madrida E-Liceo. Majo 2025)

## Artikolo pri murdita esperantisto de Majorko.

"Libera Folio" publikigis artikolon pri Josep Salom Nadal, komunista esperantisto, kiu estis murdita en oktobro de 1936, komence de la interna milito en Hispanio. La 31an de majo, memore al li, estis inaŭgurita en Pla de Na Tesa (Majorko) "stumbliga ŝtono" – surstrata memortabuleto kun lia nomo antaŭ la domo, kie li loĝis.

Laŭ oni diras en la artikolo, "*Taŭgas memori ke Majorko tuj ekde la komenco de la milito falis en la flankon de faŝistoj. Tre kompreneble, ne facilas eskapi el insulo. Pro tio, persekuto de maldekstruloj, aŭ simple de homoj kontraŭ kiuj la puĉistoj havis personan malamikecon, okazis sisteme en vilaĝo post vilaĝo, kvartalo post kvartalo dum la tri jaroj de la milito okazanta en la lando, kaj kompreneble ankaŭ poste*".

(T.B. 02/06/2025)

## Novaj komitatanoj de UEA por Hispanio.

Okaze de la renovigo de la komitato de Universala Esperanto-Asocio, HEF, kiel landa asocio, devis (re)elekti unu A-komitatanon (reprezentanton de la landa asocio). Tiun funkcion faris dum multaj jaroj Ángel Arquillos, sed li ne rekandidatis pro siaj sanproblemoj. Do la HEF-estraro elektis novan A-komitatanon por la sekvaj tri jaroj: **Carlos González Spínola**, el Malago.

Krome, okazis elekto de novaj B-Komitatanoj de UEA (reprezentantoj de la individuaj membroj). Inter la novaj elektitoj estas unu devenanta el Hispanio: **José Antonio del Barrio Unquera**, el Madrido.

(“La Bitbulteno” de HEF. Nro. 100. Aprilo 2025)

## Meta AI" en Vacapo.

Probable, vi (uzanto de Vacapo) havas, de antaŭ kelkaj tagoj, iun bluan cirkl(et)on kiu rilatas al ilo de "Meta" pri AI (Artefarita Intelektulo).

Ĝi aperas kaj funkcias kiel iu alia kontakto. Per ĝi eblas demandi kaj ricevi respondojn. Mi scivolemis ĉu ĝi funkcias en Esperanto kaj mi demandis.

Kurioze, la respondo ekaperis en Esperanto sed tuj aperis (kaj restis) en angla lingvo. Jen la ripetata respondo:

>> I don't understand Esperanto yet, but I'm working on it. I will send you a message when we can talk in Esperanto.

(Mi ankoraŭ ne komprenas Esperanton, sed mi laboras pri ĝi. Mi sendos al vi mesaĝon kiam ni povos paroli en Esperanto.)

En aliaj lingvoj ĝi respondas. Eble, la ilo estas esperanta komencanto kaj se estas sufiĉe da uzantoj, iam aperos en Esperanto.

(L.N. 06/04/2025)

## Novaj eldonaĵoj prezentitaj en la hispana kongreso.

- SATeH (SAT-en-Hispanio) prezentis **“Historieroj el alia vidpunkto”**, kolekto de epizodoj publikigitaj en “El Salto” de la ĵurnalisto Eduardo Pérez, en traduko de José María Salguero (Kani).
- Alia libro ĵus eldonita de SATeH estas **“Maruja Mallo. Multe pli ol avangarda artistino”**, dulingva biografio pri grava pentristino de la dudeka jarcento. Ĝia aŭtoro estas Ana Manero.
- Antonio Valén prezentis du literaturajn tradukojn: **“Mil kretenoj”**, novelaro de la kataluna nuntempa verkisto Quim Monzó kaj **“Rekviemo por hispana kamparano”**, de Ramón J. Sender.
- **“Galegio estas mondo”**, kun tekstoj de siatempe tre fama galega intelektulo Vicente Risco, kun traduko de Alejandro Pareja.
- Miguel Gutiérrez Adúriz prezentis la kvaran eldonon de sia vortaro **Amika**.

Por mendi tiujn kaj aliajn librojn, kontaktu HEF-on ĉe la adreso **[libro@esperanto.es](mailto:libro@esperanto.es)**.

### IJK 2025 en Indonezio. Survoje al 150 partoprenantoj.

La 81-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO (<https://ijk2025.tejo.org/>) okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisarua (Bogor), Indonezio.

Ĝi estas la unua IJK kiu okazos en Indonezio, granda insularo en Sudorienta Azio konata pro ties kultura, ekologia, kaj lingva diverseco, kaj krome pro multaj lokoj proklamitaj kiel mondaj heredaĵoj de Unesko. La kongresa temo estas “Diverseco, solidareco kaj toleremo”, sub kiu okazos programeroj kiuj reliefigos la kuriozan kazon de diverseco en Sudorienta Azio kaj kion lerni de tiu diverseco. Dum IJK, tre specialan okazon kune prifestos kongresanoj: la 80-an datrevenon de la Sendependiĝo de Indonezio el Nederlando en 1945.

Ĝis nun aliĝis 140 homoj el 33 landoj, el kiuj plej multaj aliĝis el Indonezio (22), Japanio (12), Aŭstralio (12), kaj Ĉinio (8). Krom ili, aliĝis ankaŭ junuloj el aliaj landoj de Sudorienta Azio, ĉefe Filipinoj kaj Vjetnamio (po 7), Orienta Timoro (6) kaj Tajlando (2).  
(Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 1232. 2025-05-30)

### Preskaŭ 1000 aliĝintoj al la 110a UK en Brno.

Je la 1a de junio 2025 jam 989 personoj el 62 landoj aliĝis al la 110a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2025 en Brno, Ĉeĥio.

Ĉi tiu nombro estas je 86 malpli granda ol tiu de la 108a UK en Torino, kiu okazis somere 2023; tiam je la 1a de junio la aliĝstatistiko montris 1075 aliĝintojn el 61 landoj. Estas certe, ke ankaŭ al Brno ĉi-somere venos pli ol mil esperantistoj.

En la landa plejlisto la kongreslando Ĉeĥio kun 112 aliĝintoj plu restas la unua, ĝin sekvas Germanio kun 111 aliĝintoj. Probable ankaŭ Pollando superos la nombron 100. Liston de la landoj kun pli ol 25 aliĝintoj:

112 Ĉeĥio	111 Germanio	96 Pollando
80 Francio	39 Hungario	34 Ĉinio
34 Koreio	30 Brazilo	30 Usono
27 Hispanio	27 Italio	26 Nederlando

### Venontaj kongresoj kaj renkontiĝoj.

05 jul-13 jul	Baltiaj E-Tagoj (BET)	Kaŭno – Litovio
19 jul-26 jul	Kongreso Inter.Ligo Esp. Instruistoj (ILEI)	Beogrado - Servio
26 jul-02 aŭg	Universala Kongreso (UK)	Brno (Burno) – Ĉeĥio
09 aŭg-16 aŭg	Internacia Junulara Kongreso (IJK)	Cisarua – Indonezio
09 aŭg-16 aŭg	Kongr. Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)	Greziljono
23 aŭg-30 aŭg	Kongreso de Itala E-Federacio	Salsomaggiore Terme
<b>14/18 jul 2026</b>	<b>Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF)</b>	<b>Portugaleta – Bizkaio</b>

(Pliaj informoj en Eventa Servo: <https://eventaservo.org/ik>)